


# P O N T O ☆


*Jaro 3 N-ro 1 (15) Organo de Sunda Esperanto Agado Februaro 2004*

## SEA-kunveno en Helsingborg
### la 6-an de marto 2004.

**Bonvenon al la sesa planadkunsido kadre de la Sunda Esperanto Agado. La kunsido okazos sabaton la 6-an de marto 2004 ekde la 10-a horo en Faktorsgatan 5.**

**De Knutpunkten iras aŭtobusoj numeroj 3 kaj 7, la haltejo nomiĝas Faktorsgatan. Numero 3 foriras de haltejo en la aŭtobusa halo de Knutpunkten je 09.40, kaj numero 7 de haltejo en Järnvägsgatan je 09.34.**

Oni ankaŭ povas promeni laŭ vojo montrita sur la mapo.




Por eniri premu la butonon ”PRO” kaj atendu respondon.

Ni ofertos kafon/teon kun bulkoj por 20 kr, tagmanĝo kaj posttagmeza kafo por 60 kr. **Bonvolu anonci vin plejlaste la 1-an de marto ĉe Ann-Louise 042-291262 (hejme), 042-186639 (oficeje) aŭ al_akerlund@yahoo.se (interrete).**

### Propono pri tagordo

1. Raportoj pri la hejmpaĝo, pri kursoj kaj aranĝoj, pri la planoj de la kluboj …
2. Opinioj kaj proponoj pri la gazeto Ponto.
3. Okazontaj kursoj kaj aranĝoj en la regiono, la de Danielo proponita kursplano.
4. Aliaj diskutindaj/-endaj temoj.

## BONVENON FESTI KUN NI!

**HELSINGBORGS ESPERANTO-FÖRENING – KLUBO ESPERANTISTA DE HELSINGBORGO**
fondiĝis la 8-an de marto 1934 sub la nomo ”Esperanto-Societo La Espero”. La nomo estis ŝanĝita en februaro 1966. Jam antaŭe, almenaŭ ekde la 1929-a jaro, Helsingborg havis du klubojn: ”Hälsingborgs Esperantoklubb – Klubo Esperantista” kaj la laborista klubo, kiu aliĝis al SLEA.

### Dimanĉe la 21-an de marto 2004 estos
### Jubilea festo

**Tempo:** **Je la 14-a horo 2004-03-21**
**Loko:** **Faktorsgatan 5 (vidu priskribon ĉe la invito al la SEA-kunveno)**
**Programo:** **Mallonga raporto pri la historio de la klubo, komuna kantado kaj manĝado.**
**Prezo:** **75 kr**
**Aliĝo:** **Antaŭ la 16-a de marto al Ann-Louise, tel 042-291262 (hejme), 042-186639 (oficeje) aŭ al_akerlund@yahoo.se (interrete)**

**KORAN BONVENON**
**DEZIRAS**
**KLUBO ESPERANTISTA DE HELSINGBORGO**

Nästa Ponto, nr 2
utkommer ca 2 april.
Skicka allt material till
*Karin Lindquist*
senast den 19 mars.

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté*/redakta komitato:*
**Kontaktperson**: *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20
Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Helen Claesson (desegnaĵoj), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado), Gertrud Lund.


ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 75 N-ro 1 (684)* >>Ĉiam antaŭen<< Fondita en 1906


## Nova jaro – nova prospero!

Kiam Mikaelo Bronŝtejn vizitis Malmö, li prelegis en la du sekcioj de la Popolaltlernejo de Kvarnby. La studantoj multe scivolemis pri esperanto kaj kelkaj studantinoj poste demandis Sten ĉu eblus lerni esperanton.
Ankaŭ la membroj de Sundaj Junuloj petis Sten gvidi esperantan kurson.
Sed ĉu Sten povas gvidi ĉiujn kursojn por komencantoj kaj daŭrigantoj???
Intereso por esperanto ekzistas, sed ni ne povas reklami por la lingvo, ĉar ni ne havas sufiĉe da instruistoj kiuj povas gvidi kursojn.
La ege granda manko de nia klubo estas sekve la manko de instruistoj por komencantoj kaj daŭrigantoj.
Estas ĉies devo labori por la progreso de esperanto!
Kjell Persson gvidas la konversacian kurson, en kiu ĉiuj membroj estas bonvenaj. Ekzerco de esperanto estas necesa.
Partoprenu lian kursen – vidu informon aliloke.

Karin Lindquist

**Konversacia kurso**
Ĉiujn, kiuj volas plibonigi sian Esperantan paroladon mi bonvenigas al nia konversacia kurso.
Ĝi komencas la 20-an de januaro. La tempo estas kiel kutime inter la 19-a kaj 20.30-a h.
Ĉiuj membroj estas bonvenaj senkoste partopreni la kurson, ĉiufoje aŭ kelkfoje! Kjell Persson


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius sten@agado.net*
☏ 040-19 14 77


**La 3-an de decembro**
nia klubo havis la lastan kunvenon por 2003. Ni aŭskultis kantojn (CD) faritajn de rusa esperantisto. Nia ĉarma knabino Nora ludis kristnaskajn muzikaĵojn sur sia fluto kaj mi ankaŭ havis sonbendon de radia programo ”Språket” pri UK, somere en Gotenburgo.
Dum la kaftrinkado, ni ĝuis la kanton Sankta Lucio, kiun kantis Lin Fang, kaj Gerd Rodén legis du poemojn pri advento de Malte Markheden.

Asta Schaedel

**Mikaelo Bronŝtejn 13.01**
La vizito de Mikaelo Bronŝtejn 13.1 en nia klubo interesis multajn klubanojn kaj alvenis esperantistojn ankaŭ de Lund kaj Trelleborg.
Mikaelo ĉarmis nin per sia gitarludado kaj kantado de plejparte propraj melodioj. Liaj rakontoj pri esperantista vivo en Rusio vekis grandan atenton.

**Mikaelo Bronŝtejn en la popolaltlernejo**

Dum sia restado en Malmö 12-13 de jan. Mikaelo Bronŝtejn havis okazon muziki en la du sekcioj de la popolaltlernejo de Kvarnby. Estis aranĝo farita de Sten Svenonius kiu agis kiel interpretisto.
La studantoj atente aŭskultis la kantojn esperantajn kaj rusajn kaj ankaŭ kaptis la okazon demandi pri la vivo en Rusio, sed antaŭ ĉio, multe scivolemis pri esperanto. Do, sukceso kaj por la klubo kaj por esperanto.

Gertrud Lund

**Kopenhaga Esperanto-kulturgrupo**
festis Zamenhofan vesperon la 13-an de decembro. La programo estis tre varia kaj altkvalita.
Post bonvenigaj vortoj de Torben Svendsen ni kun intereso aŭskultis Mogens Rude Andersen rakonti pri japana kulturo. Emocie Maria Henriksen legis proprajn poemojn. Ni vere ĝuis la fratojn Jonas kaj Mathias Dalmose ludi irlandan muzikon. Grava punkto de la vespero estis aŭdi pri la vivo de Ludoviko Zamenhof. La vigla babilado dum la manĝado kaj trinkado indikis, ke estis sukcesa vespero pro kiu ni kore dankas

Gastoj de la alia flanko de la Sundo

**Je memoro de Olle Olsson la klubo ricevis mondonacon de:**

Per-Olov Johansson
Ann-Christin Krondahl
Åke Palm
Kjell Persson
Sten Svenonius
Ulla Ullfors
Albert Vel
Elsie Lindblom-Vel



ĈIUJ ESTAS KORE BONVENAJ AL NIA
PRINTEMPA FESTO
sabate la 17-an de aprilo je 16.00 h en la klubejo Kronetorpsgatan 94
Detala programo en la venonta numero de PONTO.

REZERVU JAM NUN LA TAGON!
KLUBO ESPERANTISTA DE MALMÖ

Medlemsavgiften
**Glöm inte betala din medlemsavgift för 2004 så du bl.a. kan erhålla medlemstidningen PONTO.**

# Kontaktilo

*Membrogazeto de K.E.K*
*Konversacia Esperantista Klubo*
*Kopenhago*
N-ro 1 (654) februaro 2004 68-a jaro



LA ESTRARO
Prezidanto kaj redaktoro
Jytte Sunekaer
Højlundshusene 16
3500 Værløse
Tel: 44 48 47 26
Jytte.Sunekaer@mail.tele.dk

Kasisto
Arne Casper
Bryggervangen 70, 4. tv
2100 København OE
Tel: 39 20 63 48
Mobilo: 21 40 84 87
Ĝirkonto 202-5558.
arne-casper@email.dk

Vicprezidanto
Bent Wiinberg
Naeldebjerg Allé 30
2670 Greve
Tel: 43 90 42 01
teo@post11.tele.dk

Sekretario
Jens S Larsen
C/o Trillingsgård
Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
Tel: 24 47 50 40
jens_s_larsen@yahoo.dk

Ole Blaust
Ny Kongensgade 18, 2. th.
1557 København V
Tel: 33 33 90 30
blaust@mobilixnet.dk

Libroservo de DEA
Arne Casper
libroservo@esperanto.dk

## Karaj legantoj

La 23-an de februaro vi havos okazon partopreni en nia ĝeneralkunveno. Dum la klubvesperoj estas vivo, ĉar multaj venas por la diversaj aktivecoj. La subaj informoj estas faritaj de ni DEFA/KEK kune.

### NB NB NB Retadreso

En la retbabilejo, kiu funkcias en la klubejo ĉiulunde, eblas nun por la klubo sendi kaj ricevi interretmesaĝojn, ĉar nun ni havas interretadreson:

**defakek@hotmail.com**

Rakontu pri tiu adreso al viaj esperanto-rilatuloj. Ni esperas, ke tio faciligos kontakton inter la kopenhagaj esperantistoj kaj la tuta mondo.

Ni ofertas por la printempa sezono la jenon rilate al kursoj kaj studgrupoj:

## Kurso por komencantoj kaj kurso por progresantoj:

5/1, 12/1, 19/1, 26/1, 2/2, 9/2, 16/2, 1/3, 8/3, 15/3, 22/3, 29/3
Instruantoj:
Por komencantoj: Bent Jensenius
Por progresantoj: Amir Hadziahmetovic
La kursoj konsistas el 12 x 2 lecionoj, instruhoroj 18.45-19.30 kaj 20.00-20.45
Prezo: 250 kr

**Legogrupo por tiuj, kiuj ricevis instruadon kaj ŝatus legi tutan libron kaj diskuti la enhavon,**
19/1, 26/1, 2/2, 9/2, 16/2, 1/3, 8/3, 15/3, 22/3, 29/3
Gvidanto: Arne Casper
La grupo legas dum dek vesperoj, 19.00-19.45 kaj 20.00-20.45
Prezo: por membroj de KEK la partopreno estas senpaga.

**Studgrupo duflanka** - ni diskutu, ĉu ni simple dividu en du grupojn:
H.C.Andersen 200jariĝus 2005 - ni tradukos fabelojn
Kolker: 'Vojaĝo en Esperanto-lando'
Informoj ĉe Lene Niemann kaj Bent Wiinberg
La grupo funkcias ĉiun duan lundon (alterne kun programoj) je horo 20.00-20.45 kaj 21.00-21.45.

## Kluba raporto

08.12 La membrokunveno de DEFA, Kph: Lene Niemann transprenis la taskon de komisiito post Astrid Birkbak.- Karen Olsen transprenis lokon en la programkomisiono, kiun Ole Blaust diskrete forlasis antaŭ kelka tempo.

15.12 La julmikfesto: Henning Olsen gvidis nin tra la vespero. La komencanta grupo distris nin. Kim Henriksen ludis/kantis kun ni ĉirkaŭ la kristnaskarbo. Estis emocia.

05.01 Zofia Fornalowa prezentis la historion pri Lidja Zamenhof, kiu plene dediĉis sian vivon al Esperanto. Estis bona prezentado.

12.01 Mikaelo Bronŝtejn el Rusio: Pro oferto de Ileana Schrøder ni iom abrupte aranĝis viziton de Mikaelo Bronŝtejn, kiu kantis/ludis, prelegis pri la rusa literaturo, kulturo kaj pri la nuntempa situacio en Rusio. Li estas profesia artisto, kiu regas distri nin.

## Jarraporto pri la agado de KEK 2003

La membronombro estas 60, kiu dividiĝas jene: 50 aktivaj, 5 familiaj, 4 pasivaj kaj 1 honora.
La estraro kunvenis 5 fojojn. Nia organo, *Kontaktilo* pere de *PONTO* aperis 7 fojojn entute.
La komuna grupo SEA okazigis du labor-kunsidojn: la 4-an fojon en Lund (marto) kaj la 5-an fojon en Malmö (novembro).
La ĉeno de helpantoj: Karin redaktas, Sten paĝaranĝas, Helen desegnas, Jens kopiadas kaj Jytte elsendas nian PONTOn.

*Æiulunde* ni kunvenas kune kun la fervojistoj. En la komenco kelkaj el ni laborkunvenis pri la anoncado, retbabilejo, kursoj kaj programoj. Ni ricevis retadreson al la klubejo.

Kurso por komencantoj printempe efektiviĝis. En la aŭtuno ankaŭ ekfunkciis kurso por daŭrigantoj. Studgrupon Bent Winberg kaj Lene Niemann gvidis.

*La jarkunvenon* de DEA ni aranĝis, ĉar ĝi okazis ĉi tie en Kopenhago.

*Eksterordinara kunveno:* Marko Lins prelegis al ni pri la komunikadcentro de EEU (junio).

*Ni somerekskursis* du fojojn. Ni vizitis la trammuzeon "Sporvejsmuseet Skjoldenæsholm" (julio). Kaj laŭ invito de la klubo de Næstved ni vojaĝis al Fakse (junio).

*UK en Gotenburgo, Svedio,* multaj el ni partoprenis.
En januaro ni havis la *Ge-Fornalojn* kiel prelegantojn. Kaj la turneanta *Mikaelo Bronŝtejn* el Rusio distris nin.

**Jytte Sunekær**



# Jarkunveno de DEA 2004
## 24-25-an de aprilo

**La Jarkunveno de Dana Esperanto-Asocio okazos en la Junulara Gastejo de Aalborg, Skydebanegade 50.**

**DEA invitas ĉiujn membrojn kaj gastojn el niaj najbaraj landoj, kaj al la prelego de Robert Phillipson aparte la nemembrojn kaj esperantistojn kiuj interesiĝas pri la lingvaj problemoj precipe en Eŭropo.**

### La programo
### Sabate la 24-an de aprilo

**14.00 Sporogpolitik; hvilke utopier er realistiske**
**Prelego de dr. phil. Robert Phillipson en la dana lingvo**

**15.45 Aktiva neŭtraleco - Humaneca Internaciismo**
**Prelego de Birthe Lapenna**

**17.00 Lingvoj kaj komputiloj**
**Prelego de Eckhard Bick**

**18.30 Festmanĝado**

**20.00 Distra vespero**
**Muziko de Jonas kaj Mathias Dalmose**



### Dimanĉe la 25-an de aprilo
**9.30 Generala kunveno de DEA kaj EJDO**

**12.00 Lunĉo**

Mendo de la programo kaj aliĝilo ĉe: Ina Schultz, tlf. +45 32 52 19 58, retadreso: ina.schultz@get2net.dk

# SUNDAJ JUNULOJ

La 19:an de decembro Sundaj Junuloj renkontiĝis ĉe Anneli en Malmö. Unue ĉiuj bakis sian propran spickukon (laŭ sia propra ideo). Poste ni provis/trinkis diversajn tipojn de brulvino kaj kristnaska biero. Estis ege amuze.



Dum la vespero ni ankaŭ ludis ludojn (TV4:s När & Fjärran) kaj sortodivenis niajn estontecojn per kartoj kaj runoj.

Ege interese estis ke Werner, laŭ danaj tradicioj, metis la sekajn figojn en akvon!! En Svedio ni neniam vidis tian metodon prepari figojn... Sed ĝi ege bongustis!

Kelkaj el la membroj de Sundaj Junuloj planas viziti la semajnfinan kurson de esperanto en Kopenhago dum februaro.

Ni ankaŭ provos viziti klezmermuzik-festivalon la 7-8 februaro en Kopenhago.

Baldaŭ komenciĝos studrondo de esperanto en Malmö. Ni sendos pli da informoj interrete al ĉiuj membroj.

Anneli Nilsson/SJ

ŭ

# SEF:s årskongress i Lesjöfors
## Kristi himmelsfärdshelgen
## 20 – 23 maj

**Ur programmet:**
En dag ägnas åt hur man skall informera på olika sätt om esperanto på en mindre ort.

Årsmötet blir på lördagen.

En dag blir det utflykt till en intressant plats.

**Vik redan nu dagarna för årets kongress i naturskön miljö!**

El esperanta civito:

## Esperanta Pen kandidatigas William Auld por Nobel-premio

Jam la okan jaron sinsekve la Esperanto-literaturo sukcesas esprimi propran, nekontesteblan kandidaton al la Nobel-premio: temas pri William Auld, baldaŭ 80-jara.

La signifo de tiu propono estas duobla: unuflanke Esperantio kapablas esprimi kandidaton, aliflanke ekzistas unuanimeco inter la diversaj skoloj pri la nomo de tiu kandidato. La nomon fakte proponas ne nur la Esperanta Pen (kiun Auld prezidis) sed ankaŭ EVA kaj aliaj. Sendependede la rezulto, la supraj kapablo kaj konverĝo estas jam rimarkinda sukceso.




William Auld estas interalie la aŭtoro de la plej grava poezia ĉefverko post la dua mondmilito: ”La infana raso”. Al la ampleksa originala produktado aldoniĝas la tradukoj, sed ankaŭ brilaj atingoj kiel didakto: ekzemple lia krestomatio ”Paŝoj al plena posedo” bonege rezistas al la tempo, kvankam jam 35-jara.

## *SENSENTECO VINTRA*

*Eble nur ŝajnas la koro sensenta,*
*Froste glacia kaj indiferenta,*
*Ofte sub masko de morta kvieto,*
*Senpacienco kaj ŝajna vegeto.*
*Ardas kaŝite sopiroj kuraĝaj,*
*Iel similaj al birdoj enkaĝaj. -*
*Kaj en la ardeno de la fantazio*
*Brilas kalikoj de floroj belformaj,*
*Al realeco neniel konformaj,*
*Bonodorantaj nur je iluzio.*

*Hilda Dresen*



Eltiro el Esperanto revuo dec. 2003:

## Danke al Thorsen-apogo kvin bibliotekoj pliriĉiĝis.

Kvin bibliotekoj en kvin landoj estas la feliĉaj gajnintoj de la ĉi-jara financa subteno el Biblioteka Apogo Paul kaj Roma Thorsen.

Ili estas Esperanto-Gesellscharft Sudharz, Esperanto-Societo Flamo en Torun, Biblioteko de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Biblioteko de Brazila Esperanto-Ligo kaj Esperanto-Biblioteko de la Fakultato pri Medicino de Montevideo, Urugvajo).

La kvin bilbioteko ricevis librojn en suma valoro de ĉirkaŭ 500 eŭroj.

| | | |
|---|---|---|
| Merkrede 11.02 | KEKG, Kopenhago | ”Mallonga historio pri la baltaj landoj kaj Baltaj Esp. Tagoj”. Prelego de Eugenius Rybarczyk |
| Jaŭde 12.02 | LEK, Lund | Jarkunveno, Krafts Torg 12 A, 18.30 h |
| Dimanĉe 15.02<br>Je la 14.-a horo | KEH, Helsingborg | Jarkunveno, Faktorsgatan 5, tagordo vido p.5 |
| Lunde 16.02 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj, legogrupo kaj studgrupoj |
| Merkrede 18.02 | KEM, Malmö | Jarkunsido. Tagordo en Ponto n-ro 7.03 paĝo 3 |
| Lunde 23.02 | KEK, Kph | KEK okazigos ĝeneralkunvenon, nemembroj estas bonvenaj ĉeesti. Por tiuj, kiuj NE ŝatas ĉeesti, ni havas diversajn ludojn kaj taskojn |
| Sabate 28.02 aŭ dimanĉe 29.02 (planata) | LEK, Lund | Semajno de Internacia Amikeco, renkontiĝo kun lunĉo kaj distraĵoj |
| Lunde 01.03<br>Je horo 18.30 | KEK/DEFA, Kph | Komuna manĝado - mendu buterpanojn ĉe Ruth tel. 36466279, aŭ kunportu mem vian manĝaĵon |
| Merkrede 03.03 | KEM, Malmö | Libroaŭkcio - Bokauktion.<br>Massor av böcker på esperanto och svenska |
| Lunde 08.03 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj legogrupo. Programo: Kial vi fariĝis esperantisto? Pripensu iomete, kaj rakontu al la aliaj – certe ni ekscios ’novaĵojn’ pri la klubanoj... |
| Merkrede 10.03 | KEKG, Kopenhago | ”La opero ”Evginij Onegin’ de P. Tjajkovskij” Prelego de Birthe Traerup - estos akompanita per muzikekzemploj. |
| Jaŭde 11.03 | LEK, Lund | Ordinara kunveno |
| Lunde 15.03 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj, legogrupo kaj studgrupoj |
| Merkrede 17.03 | KEM, Malmö | Migrado sur la belaj Azoroj. Agneta Lund rakontos kaj montros bildojn pri sia vojaĝo |
| Dimaĉe 21.03, je 14-a horo | KEH, Helsingborg | Ni festos la 70-jara jubileon. Dimanĉa renkontiĝo |
| Lunde 22.03 | KEK/DEFA, Kph | Ni rigardos televidprogramon brazilan pri ”Bona Espero”, kaj poste Astrid kaj Erik, kiuj vizitis la lokon (kvankam antaŭ kelkaj jaroj) respondis je demandoj |

**(Daŭrigo sur paøo 8)**

Informoj pri horoj kaj adresoj ktp. sur paøo 8

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

**Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.**
La kunvenoj komenciøas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aý karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

**La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.**
Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h. en la ejo de nia studorganizo SENSUS, Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange, Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aý rete: Allan Ljungstedt, allan.ljungstedt@telia.com

**Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.**
La kunvenoj okazos je la 14-a horo en Faktorsgatan 5.
Bonvolu informiøi æe Ann-Louise Åkerlund tel. 042-291262 aý 042-186639 (oficejo) aý æe Barbro Haraldsson tel. 042-121471

**Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.**
Kunvenas en la ejo de DEFA, Vasbygade 10, Kopenhago, ĉiujn lundojn inter 19.30-22.00.
Por eniri: uzu la sonorilon æe la (krad)pordo.
Prezidanto, rete:
Jytte.Sunekaer@mail.tele.dk
tel. 0045-44 48 47 26

**Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG**
Aranøoj en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport, salono n-ro 1, dua etaøo.
Pordoj malfermitaj 19.00-23.00. Æiu prelego okazos æ. 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aý havas demandojn pri la aranøoj bonvolu turni vin al Torben Svendsen, Vanløse Alle 57, DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
rete: tsvendsen@webspeed.dk

**Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA**
Kunvenejo Vasbygade 10. Kontaktulo:
Lene Niemann, tel. 0045-49 26 13 19
Retbabilejo 19.00-22.00 ordinare je
Adreso www.gxangalo.com/babilejo
Kluba retadreso: defakek@hotmail.com

Hejmpaĝo de SEA: www.agado.net Respondeculo Johan Svenonius

Daýrigo de la programo el paøo 7

| | | |
|---|---|---|
| Lunde 29.03<br>Je horo 18.30 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj, legogrupo kaj studgrupo |
| Merkrede 31.03 | KEM, Malmö | Kunportu objekton kaj rakontu pri øi! |
| Lunde 05.04 | KEK/DEFA | Pri UK89 en Pekino kaj 6a Eýrop-Unia E-Kongreso en Bilbao.(informoj pri la 89a UK en Pekino kaj la 6a Eýrop-Unia E-Kongreso en Bilbao laŭ la duaj bultenoj) |
| Merkrede 14.04 | KEKG, Kopenhago | Temo ne fiksita nun |
| Sabate 17.04 | KEM, Malmö | Printempa festo- Vårfest |